Zásluhou překladatelů esperantistů vznikly překlady třiceti trojverší básně Uslyšet duši do řady jazyků: Williama Aulda, skotského básníka do angličtiny, Japonce Kurisu Keia do japonštiny, David Šamgar prostřednictvím esperanta pořídil hebrejský překlad, esperantista Jaroslav Mráz přeložil báseň do ruštiny, Kokou Sagbadjelou z Toga, s nímž jsem si několik let psala, přeložil verše do rodného jazyka a Gerrit Berveling do holandštiny. Vznikly tak knížky Uslyšet duši 1 + 10 a Uslyšet duši 1 + 16. Překladatelé dali také vzniknout knížce s překlady textu JE JARO do 36 jazyků, ta získala v pelhřimovském muzeu rekordů čestný titul „Kniha v 37 jazycích“.

Společenství esperantistů patří k nositelům hodnot, kterých bychom si měli vážit, cenit si jich a upínat k nim naději. Může se zdát, že vysoké morální hodnoty našich velikánů jsou pozapomenuty, že mnohé jsou docela zapomenuté. Právě pozapomenuté hodnoty – vědomí si vlastní ceny, krásného jazyka, krásné české země, kterou pro nás předkové ubránili a my ji přece nebudeme chtít opouštět, sebeúcta, důvtip Čechům vlastní, i s tou trochou švejkování, tvořivost a touha po dorozumění mezi lidmi, to budou devízy ve světě, který se čím dál tím víc globalizuje.

Buďme pozorní k těm, kteří dostávají pravomoc nám vládnout. Důležité věci by měli rozhodovat lidé s širokým rozhledem, lidé vzdělaní, lidé moudří, aby už nebyly pochyby o tom, zda naše civilizace nesměruje k sebezničení.

Vedení touhou uchovat si lidství za všech okolností a posílit ho až do rozměrů duchovních, musíme svůj dnešek podřizovat těmto nadějím a o tyto naděje zápasit.

Na novoročenku pro příští rok, na P. F. 2016 jsem napsala:

Přeji Vám, přeji všem šťastně překročit novoroční práh a obejmout prostor před sebou, který zabydlí duše, ta její část, která miluje, chrání, prosvětluje a tvoří. Objmout, sepnout ruce a vše podstatné předat dál...

Předneseno 7. 11. 2015 na sjezdu ČES v Ústí nad Orlicí

Sukcesa „HELPU HELPI 2015“ Akce Cihla

Vlasta Piščíková

En junio 2015 jam okazis la dua aranĝo HELPU HELPI, dum kiu esperantistoj de E-mental'aĉetis brikojn por karitata projekto Briko, kiu helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rando de Prago.

Dum la unua aranĝo estis kolektitaj 21 brikoj. Ĉi jare estis la sukceso pli granda! Ni kolektis monon por 33 brikoj!

La brikojn, kiujn oni aĉetas, eblas laŭvole ornami kaj poste meti ilin en la muron, kiu staras meze de Prago, en strato, kie ĉiutage preteriras ne nur lokanoj, sed ankaŭ amasoj da turistoj, kiuj admirante la muron fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas reklamon por Esperanto kaj do la reklamon oni povas vidi en diversaj mondopartoj.

Kun Eva Kantůrková pri la filmo „Jan Hus“

Margit Turková

Anticipe kelkaj rimarkoj:

Al la grava fenomeno, kiu estas en Ĉeĥa respubliko la ĉefa temo por la jaro 2015, ni – ĉeĥaj esperantistoj kontribuis per du interretaj artikoloj. Neniu el ili estas „el nia propra kapo“ - ambaŭ estas rezultoj de antaŭlongjara traktado kun Eva Kantůrková, verkistino. Antaŭ 15 jaroj kaptis nin ŝia profunde prilaborita libro JAN HUS. El ĝi ni elektis kelkajn gravajn partojn (kiuj estas legeblaj sur la adreso:....).

Intertempe realiĝis dezirata evento – estis finita la filmo pri Jan Hus. Por la filmo la scenarion verkis ankaŭ Eva Kantůrková. La filmo, kies producento estas ĉeĥa televido ČT 1, jam projekciiĝas kun granda eĥo de la spektantaro. Por alproksimigi la aferon al niaj esperantistaj legantoj, ni sube publikigas la intervjuon, kiun kun EK havis ĝuste la redaktoro de ČT 1.

Mia ambicio estis priskibi la historian Hus kiel vivecan kaj unikan personecon
– diras Eva Kantůrková

La libron „JAN HUS“ vi kreis antaŭ tridek jaroj. Kiel ŝanĝiĝis la etoso, la simboleco de la fenomeno „Hus“, kiel batalo por la vero, batalo kontraŭ la oficiala stato de aferoj? Ĉu vi perceptas ian ŝanĝon almenaŭ rilate al la teksto-interpretado?

Mi opinias, ke Jan Hus simbolizas certajn konstantajn valorojn. Oni povas aŭ ne povas ilin akcepti –en lia testamento ili restas validaj. La imagin-koncepto viviĝas depende de la epokoŝanĝoj kaj la diverseco de la emfazo koncerne lian heredon. En la 19-a jrc. kaj komence de la 20-a jrc. oni perceptadis Hus alimaniere ol tion faras ni. Dume la fenomeno „vero“ restas la plej stabila. Kun tia diferenco de nia postklerisma epoko – ke Hus unusola VERO konsideris la evangelion de Kristo – la Sanktajn Skribojn. Kio rilatas la tekston mian, mi strebis senigi ĝin de diversebla eksplikado. Je la komenco de la libro Hus estas nur unu persono, tiu de la 15-a jrc. Kaj se ni volus al li proksimiĝi – tiu-ĉi origina bildo devigas la historiiston same kiel verkiston.

Kiel dum tiuj pasintaj tridek jaroj ŝanĝiĝis via opinio rilate la eventojn kaj la personojn de antaŭ 600 jaroj?

Mi ne dirus, ke ĝi ŝanĝiĝis. Mi strikte eliris el fontoj, el Hus-leteroj, el liaj predikoj, el laboroj liaj kaj el la tekstoj de liaj samtempuloj, kontraŭstarantoj kaj lernantoj. Pri tio estas nenio ŝanĝinda, mi nur strebis la tekstojn kiel eble plej precize interpreti. Per tio mi ne diras, ke mi forlasis mian propran opinion, se en ĝi dominis ĝuste mia emo nenion misdesegni.

La voĉlegadon de via libro elsendis, en la tempo de la t.n. „normalizado“, la radio-elsendejo „Libera Eŭropo“. Ĉu vi rememoras iajn eĥojn koncerne tiun aferon? Kiel al tio reagis la „Ŝtata sekurec-organo“, kiel aŭskultantoj?

Unuopajn ĉapitrojn elektis mem, kaj post la reĝim-ŝanĝo legis en la radioelsendejo, la aktorino Vlasta Chramostová. (Ĥramostova). La teksto, oni diras, elvokis fortan malbonvolon de la sudmoraviaj katolikoj. Ke la libron oni legis en la elsendejo „Libera Eŭropo“, tion mi ne scias. La reago de la totalisma reĝimo kaj de ties sekurec-organoj estis simptoma. Ja – jam pro la libro de interparoloj mi estis persekutita helpe de sufiĉe grava paragrafo kaj minacis min kelkjara prizono, sed poste nek „Amikinoj el la domo de malĝojo“ (*Přítelkyně z domu smutku*) nek „Jan Hus“ estis punktoj de la persekutprogramo – kvankam por ambaŭ libroj mi en eksterlando ricevis literaturan premion. Sen polico-intereso pasis ankaŭ mia („samizdata“) libro, kiu enhavis diskutojn de filozofoj, historiistoj kaj teologoj. Same la atenton de polico ne elvokis la kolekto-libro de laboroj, kiujn mi editoris omaĝe al la historiisto Josef Pekař (Pekarj). Sed la kolekton de diskutoj je la temo „Ĉu Hus estas ankoraŭ aktuala“? aldonis la lasta eldonisto (eld.IDEAL/Prago 2008) en la libron kiel ĝian naturan parton, ĉar li opiniis, ke la tiama diskuto (1-a eldono/1988 – MT) respondas ankaŭ al la nuntempaj demandoj).

Kiagrade via scenario kongruas kun la ĝenerale reganta skemisma imago pri Jan Hus?

Mi kredas, ke entute ne. Mia ambicio estis priskribi la historian Hus kiel vivecan kaj unikan personecon sen skemismaj ingrediencoj. Hus devus ekbrili kiel reala, ne false aldone prideseĝnita personeco. Ja nur tiamaniere oni povas kompreni la sencon de la reform-strebado kaj lian signifon sur la limofendo de la epokoj. Mian literaturan problemon pri la konstituado de la Hus-personeco kaŭzis ĉefe tio, ke el lia privata vivo konserviĝis nur malmulte da rektaj faktoj; nuraj fragmentoj el liaj rememoroj kaj leteroj. Nur la tribunalo estas detale prinotita en kronikoj. Do tial mi devis al lia afero krei ankaŭ epizodojn de personoj, kiuj kun Hus estis plej firme ligitaj kaj influis lian vivon. Avantaĝo en la kreo-procedo estis en tio, ke la koncernaj personoj ne malaperis en la ombro de Hus – eble male, kaj danke al ili Hus mem montriĝas pli reliefe. En la scenario por la menciita filmo mi la personecojn iom reduktis al iliaj bazaj trajtoj (kompare kun la libro – MT), kaj kontraŭe mi iom pli substrekis la signifon de amikec-kontakto kun la reĝino Sofia, ke la filmo ne estu senigita je alloga virina persono.

Ĝis nun la lasta filmadapto de la temo estas el la jaro 1954 pere de la reĝisoro Otakar Vávra. En kio – vi opinias – estas la diferencoj inter la kupto de Miloš (Miloš) Kratochvíl – scenariisto, kaj vi – do Eva Kantůrková?

Mi la scenarion de sinjoro Kratochvíl ne konas, sed sufiĉe detale mi konas la filmon de Otakar Vávra. En lia bildigo estas la afero de Jan Hus absolute devota al tiama ideologia postulato, en ĝi Hus ŝajnas kiel – eĉ fanatika gvidanto de premita hom-amaso, kaj precipe kiel socia kaj nacia reformatoro. En la Hus-predikoj oni ja povas trovi certan soci-koncernan akcenton kaj komprenemon – li ja devenis el la

popolaj tavoloj kaj havis al ili proksimecon, kaj pruvebla estas ankaŭ prizorgo koncerne la ĉeĥan lingvon – sed ĉio ĉi estas fenomenoj duonvicaj, deduktitaj. Hus estas precipe reformatoro religia. Neniam li negas, ke li estas sacerdoto katolika kaj la senco de lia reform-sopirado estas revenigo de la religio en la originan Kristo-formon. Tial li ankaŭ la evangeliojn kaj preĝojn tradukas en la ĉeĥan – do en la lingvon de simplaj homoj (ilin li nomas „popoletoj“), por ke ili tuj ekhavu rektan kontakton; kaj ankaŭ – ke ilin – la „popoletoj“ - liberigu el la influo de privilegiitaj sacerdotoj. Hus vivas, laboras kaj pensas en la etapo de unu el la plej gravaj krizoj de la okcidenta kristana religio-branĉo, el kiu elfluas ankaŭ krizo de la sekulara regado – kaj ĝin li superas per neatendita kuraĝo kaj originaleco: per nove formulita teorio de religio. Por Hus Kristo ne estas ia nereala, imaga persono, legendo kaj mito, kaj la Skriboj ne estas por li nura literaturaĵo. Kristo estas en lia koncerno persono viva, instigo kaj deviga ekzemplo, li perceptas Lin tiomgrade reale, ke al Li li apelacias en sia konflikto kun la papo, kaj ke Lin en sia religi-teorio faras kapo de l'komunumo de piaj kristanoj „*antaŭdestinitaj*“ kaj strebantaj pri sia redemptor-savo. Sin mem – sur la konflikt-pinto kun la oficiala religio – li nomas „la kavaliro de Kristo“, kaj lia teologia opinio tute respondas al la Platono-realismo, kiun li konfesis. En kelkaj tezoj li ligiĝas al John Wycliff, sed eĉ tie li estas memstara, kaj kiam bezone, la tezojn de l'angla teologo li adaptas al la ĉeĥa situacio. Lin ankaŭ povis influi la eŭropa spirit-movado nomata „devotio moderna“ (nova pieco), el kiu unu el la fondintoj studis en la praga universitato jam en la viv-tempo de Hus, kaj kiu ankaŭ strebis reveni la kredantojn al la origina Kristo-idealo. En tiatempa situacio, kiam la religio jam firme stariĝis kiel la institucio frunte kun papo kaj kardinaloj kiel „sia korpo“, ne povis la konstanca koncilio taksii la Hus-opinion kaj agadojn alie – nur kiel herezaj; tiam oni lin kulpigis, ke li fondas novan religion. Sed li sentis sin tiagrade sacerdoto katolika, ke la kulpigon li malakceptegis – kaj nun, sciante pason de l'eŭropa historio – oni povus diri, ke Hus eĉ ne antaŭrigardis sian propran renversigan fondo-rolon.

Kiu el personoj krom Jan Hus estas por vi alloga, por la spektantoj de l'filmo inspira?

Ĉar la komplikitecon de Hus-agadoj, de lia teologio kaj de liaj filozofiaj opinioj en ties-epoka formo oni nur malfacile transformadas en la nunan komprenon de la evento, mi „elpensis“ por Hus partneron: li akompanas Hus ĉefe ĉe ties konfliktoj kun la koncilio, kaj kiel Hus-oponanto li klarigas ties reforman kaj homan poziciojn. Li nomiĝas „Patro“, estas dominik-ordenano – do la ano de ordeno, kies tasko estis gardi la veron de la konfeso; li estas sufiĉe klera, en la koncilio li havus pli moderan pozicion, kaj lia tasko ne estas Hus kondamni, sed konvinki lin pri eraroj... La figuro ne ekestis senkaŭze – ian „Patron“ mencias Hus mem en siaj leteroj el Konstanco sufiĉe ofte, li eble elportadis Hus-leterojn el la prizono. Por la spektanto li havas jenan sencon: li metas demandojn, kiujn al Hus metus la spektanto mem. Krome, mi opinias, la spektantojn kaptos ambaŭ reĝoj - do Venceslaŭo kaj Sigismondo. Rimarkindas, ke Sigismondon oni legu kaj perceptu alimaniere ol en Ĉeĥio estas kutime: li ne estas „vulpo ruĝ-hara“ malutiliganta al ĉeĥoj, sed decidiĝema kaj talenta politikisto strebanta pri la kvietiĝo de la eŭropaj konfliktoj kaj pri la malestiĝo de la religia

krizo fontanta el „tripapeco“; al la Ĉeĥa reĝolando, de kiu li estas probable heredonto de la trono, li havas ambiguan rilaton: li emas anstataŭi la malkapablan Venceslaŭon, kaj samtempe li devas konsideri la volon de la ĉeĥa nobelaro; kaj koncerne Hus, kiun la nobelaro subtenas - li ŝate vidus lin kiel humilan kaj de la koncilio liberigitan homon – kaj nur pro la Hus-maksimecemo li estas devigita konsenti kun la herez-ŝtiparo.

Štěpán (Štepan, Stefano) Páleč (Paleč) – ĉu li estas diablo-spiritulo – ol nur si interne konvinkita adepto de la oficiala „establiŝmento“?

Štěpán Páleč, kiel mi lin leg-komprenas, estas tragika persono – certe ne „diablospiritulo“. Li estas komandema, ambicia, tre inteligenta kaj pensema; klerulo de sufiĉe granda formato, sed ankaŭ homo, kiu pli frue parolas kaj agas ol pripensasla konsekvencojn – ĝuste kiel tio respondas al lia impulsigema karaktero. Sub la premo de la oficiala religio, kiu lin akuzis pri wycliffa-hereziĝo, li ĉiam cedas al siaj ekstremaj opinioj, kaj sian retiriĝon de Hus li komprenas kiel novan ekscion. Akrajn procesojn li efektivas ankaŭ koncerne sian novan pozicion kaj estas dum ili tiom turmentvolema, ke la koleriĝinta Venceslaŭo lin ekzilos el la Ĉeĥa reĝolando pro instigado de konfliktoj – ankoraŭ antaŭ la konstanca koncilio. En Konstanco li akuzas Hus – kun kiu ili estis, pro iamaj samopinioj, reciprokaj amikoj – el humana vidpunkto sufiĉe fimaniera, en siaj akuzoj li estas iniciatema – sed oni diru laŭprave, ke li tion faras pro sia forta interna konvinko. Kontraŭ Hus li eĉ ellaboras sian propran teorion de eklezio, kiu respondas al la tiama instituta formo kaj al ties oficiala opinio – kaj kiel idea kaj spirita ago ĝi ne povas esti neglektenda. Pro la konflikto kun Hus li estas forte malfavoriganta, li ne povas reveni en la Ĉeĥan reĝolandon, ĉar tie li estis post la Hus-ekzekuto proklamita publika nocanto. Li sukcesiĝis kiel negrava profesoro de teologio en Krakovo.

Kion por ni signifas, aŭ signifi povas, Jan Hus hodiaŭ? Kion li farus, kion li kritikus, se li naskiĝus en la nuntempa epoko?

Hus naskiĝis sur la sojlo de du epokoj – de la gotika kaj de la renesanca; kaj lia signifo estas ankaŭ en tio, kiel li scipovis kunligi la idealisman platonismon kun la profana renesanca aristotelismo. Eble pro tiu ĉi larĝa skalo de konscio kaj efiko de ĝi li restas ĉiam viva; estas kion elektadi por la cerbumado. Per la originala kaj ĝis nun ne superigita maniero enigis lin en modernan konscion František Palacký. Li elpensis, rilate la Hus-heredaĵon, en la tiama epoko tute nekutiman nocion „dieco“. Ĝin poste transprenis en sian filozofian leksikon Tomáš Garrigue Masaryk (la unua ĉeĥa ŝtatprezidento – MT) kaj Karel Kosík. TGM la nocion ligas al la religia koncerno kaj enigis ĝin ankaŭ en sian difinon de humaneco kaj humanismo. Karel Kosík komprenas ĝin kiel strebado de la homo al perfekteco. Ĉe ambaŭ la nocio „dieco“ signifas koncernon de l’homo al pli noblaj valoroj ol estas nur profana kaj privata interesoj. En tiun ĉi grupon mi envicigus ankaŭ Milan Machovec. Mi ne kuraĝas kalkuli kiom da temoj la kritikema spirito de Jan Hus trovas en nia situacio, sed mi opinias, ka ĝuste la menciita „dieco“ estus la eco, per kiu li diferenciĝus de la nuntempuloj; la spirito-principo, kiu estas pli alta ol nia personeco. Eble tio estas ĝuste la fenomeno, kiu al nia tempo mankas.

Ĉu la persono de Jan Hus havas similulon en la moderna historio? Kiaj historiaj

personoj estas laŭ via alrigardo kun Hus kaj lia heredaĵo kompareblaj?

Seninterrompe al Jan Hus kontinuas la komunumo nomata „Bohemia Frataro“⁴⁴, kaj granda persono de la ĉeĥa kaj eŭropa historioj – Jan Amos Komenský – Comenius (Komenio). Cent jarojn post la morto de Hus transprenas lian teorion de eklezio, en Germanujo, Martin Luther; kaj la germanoj farigis en Worms skulptaĵon, kiu bildigas la tri fondintojn: John Wycliff, Jan Hus, Martin Luther. Kio koncernas la historion modernan – do certe Martin Luther King, kiu per sia agado kaj vivo preparis profundan ŝanĝon de l’socia konscio kaj renversiĝon de la situacio. Reeĥojn de Jan Hus oni povas trovi en la agado kaj filozofio de TGM. Certan similecon oni povas spuri en la vivo kaj agado de Mahátma Gándhí. Komuna estas la konscia reformec-spirito kaj rezisto kontraŭ perforto, sed tio ja ne estas surface formalisma. Lia reformemo efikas profunde al la koncernaj situacioj. Tre emocie kaj ankaŭ konscie rememorigis tion al ni alia Jan – do Jan Palach, kies ago sendube anticipis la kontraŭreĝiman elstaron.

Ĉu vi konsultis (kun la reĝisoro Jiří Svoboda) la distribuon de la du ĉefaj roloj. Ĉu la artisto Matěj Hádek estas tia Jan Hus, kiun vi bildigis?

Tion mi ne emis. La imago de la verkisto rilate la personon estas prefere pripensa ol vidmaniera, tio ja estas vido de la reĝisoro, lia elekto.

Rimarko: se mi insistus pri la person-imago, kiun mi pro diversaj indicoj deduktis por mi mem, ne estus tio Jan Hus pere de Zdeněk Štěpánek (Zdenjek Ŝtjepanek) en la filmo de Otakar Vávra, nek renesanca figuro, altstatura, kun longa barbo, nek Hus, kiel lin bildigis Ladislav Šaloun (Ŝaloun) en sia granda skulptur-grupo, kiu staras sur Staroměstské náměstí en Prago (Malnovurba Placo – MT).

Jan Hus devenis el vilaĝa kamparana medio, staturon li havis iom – onidire – dikecan kaj kiel sacerdoto li devis sin razi. Tiel simile li estas bildigita en kelkaj kronikoj. Por la filmo oni nepre kreas iom idealan, iom eĉ mistikan bildon, kaj mi estas scivola, kiel la publiko akceptos la film-artiston Matěj Hádek – li estas belaspekta, en siaj manifestoj civila.

Verkoj de kiuj ĉeĥaj historiistoj estis por vi inspiro, subteno, korektilo?

Unue nin, studentojn, kaptis nia profesoro Josef Macek. Mi trovis mian notkajeron – la parto pri la Hus-ekzekuto estas makulita per larmoj. Same forte influis min Josef Pekař (Pekarĵ), kiu inkludis la tutan husitan epokon en sian libron pri Jan Žižka (Ĵiĵka). Tiu ĉi majstro de ĉiuj majstroj, la sciencisto kun animo de viziulo, la historiisto en kostumo de poeto, kiu dum nia studado estis malpermesita, sed kiun ni legis sekrete – do tiu poreterne direktigis mian senteman impreson al impresoj tute racia. Okazis tio en la momento, kiam Pekař nomis la konfeson de Hus „gotika“. Tiam la Hus-epoko sterniĝis antaŭ mi plene en sia bunta kaj rompiĝa bildo. Mi dirus, ke en la Pekař-klarigo ricevas la agado kaj la morto de Hus sian profundan – ne nur historian, sed ankaŭ filozofian sencon.

Poste estis jam nemultaj historiaj stud-fontoj kaj monografioj. La verkisto devas estimi la personon,

pri kiu li rakontas, li estas al tiu ĉi submetita, li devas prizorgi la purecon de la bildo, kiun li pri la koncerna figuro kreas; pro tio li nepre evitu fremdajn katenbildigojn. Ne esti influita...

La 12-a ĉapitro de via libro JAN HUS nomiĝas „Certeco de obeemo kaj malobeemo de konscienco. En kia formo ni kun tiu ĉi malakordo renkontiĝadas nuntempe?

La titolo de la ĉapitro esprimas eble ĉefe la medion, en kiu Hus vivis, kaj ankaŭ la fermitecon de la sistemo, en kiu mi la libron skribis. En ili ambaŭ estis en akra kontrasto la fenomenoj kiel obeemo kaj ribelemo, konformemo kaj konsekvenco – sed nun la mondsistemo starigas kontraŭ si kontrastojn tute aliajn. Ekzemple – deziratan profiton de privata validiĝo – kaj ploron de konscienco. Ankaŭ oni tion provas esprimi pli ordinare: egoismo kontraŭ solidareco, mem-amo kontraŭ lojaleco. Páleč – kiun la ĉapitro koncernas – estus en nuntempa bildigo kiel ruzema ulo, kiu dum atingado de sia ambicia celo tiel trafe prijuĝas siajn eblojn kaj limigojn – ke ilin sukcese superas.

Kiel en via scenario respeguliĝas la fakto, ke Hus estis precipe kredanta homo, kaj ke la kerno de lia afero estas – laŭ tiatempaj mezuroj – herezo?

Pri la Hus-herezeco mi diras en la supra alineo, kaj rilate la filmon – en ĝi la punkto de la film-procedo estas ĝuste la apelacio de Hus al Kristo. La dramo-momento, kiu decidas pri lia vivo kaj en kiu Hus nerefuteble dubigas la aŭtoritatecon de la institucio, kiun li opinias malorda - kaj kiun li superas per sia apelacio al la ideala vero de la Sanktaj Skriboj. En la filmo la bildo de Kristo akompanas ĉiujn gravajn scenojn, estas tio senĉesa belarta motivo kaj ageca impulso.

Kion vi opinias pri la starpunkto de la nuna katolika eklezio rilate Jan Hus?

Tion mi ne emas prijuĝi. La katolika eklezio pere de la papo pardonpetis koncerne la Hus-ekzekuton, sed ne finpretis la opinion pri la konflikto kun la koncilio. Kiam tiuj traktadoj iris, estis por mi ĝojo aŭdi (el buŝo de ĉeĥa komisiito por la Hus-rehabilito), ke mia libro estis por ili helpo. Kiam mi estis preparanta la scenarion, ni traktis kun la ekumenaj komisionanoj (preparantaj la Hus- omaĝon), kiuj estas la episkopo František Radkovský kaj la kardinalo Duka. Ne pro tio, ke nia scenario estu de ili aprobita, sed ni volis anticipi ilin certigi, ke ni ne preparas iaforman ideologian provokon, ke ni volas bildigi la personecon de Hus en lia – kiel eble plej verŝajna versio.

Kaj kiel vi prijuĝas la epokon, kiu alvenis tiel dirite „post Hus“ - do la husitaj bataloj?

La eksplodo de la husitaj bataloj certe estis kaŭzita pro la Hus-ekzekuto sur la brul-ŝtiparo. Poste la rezulto de la husita movado estis finfine la kontrakto de la ĉeĥa nobelaro kaj de reformita eklezio kun basela koncilio, kaj certigo de religiaj liberecoj por la venontaj du jarcentoj. Per tio ĉi la husisma revolto, ankaŭ tiu perforta, gvidata de Žižka, enigis la Ĉeĥan reĝolandon en la centron de la eŭropa historio. Kiel ĉiuj grandiozaj eventoj ankaŭ tiuj husitaj bataloj estas ambiguaj kaj pro tio ili restas vivaj.

Tradukis Margit Turková

Morgaŭ eble ĉio estos alie

Tomáš Břicháček

vendredo la 10-an de oktobro 2081, frua vespero

„Kiam krepusko malrapide falas, mia Dio kiel estas dolĉe sonĝi...“ murmuris al si sola marŝanto antaŭlonge forgesitan kanton, kiam li ascendis sur herbaĉa kampa vojo. „*Kuŝiĝas ankaŭ silentigitaj gregoj, kaj ĉie regas paco kaj kvieto ...*“ En la ĉielo okcidente lumis ĉielruĝo kaj la magia naturo ĉirkaŭe prenis subtile oranĝan nuancon. Nenie videblis eĉ unu vivulo; nur sovaĝa bestaro plezure ĝuis la liberecon, kiun ofertis al ĝi la senhoma lando. Ankaŭ la malhelhara svelta longegulo en sportjako kun aktoj en la mano, kiu teniĝis rekte kiel soldato, ĉi tie malproksime de Prago sentis sin libera kaj sekura. Ĉi tie ne minacis renkontiĝo kun rabemaj grupaĉoj el la antaŭurboj, neregeblaj neplenkreskuloj, ordoĝenuloj aŭ ĝihadistoj. Kaj se tamen iu ... – li tuŝis leĝere per plata mano la jakon, ĝis kiam li eksentis pistolujon, kaj ekridetis.

La viro haltis kaj retrorigardis malsupren al la valo, kiu etendiĝis laŭlonge de malgranda rivereto. Defore kaj en la fruvespera malintensa lumo ĉio aspektis preskaŭ tiel, kiel en la tempo de lia infaneco. Ĉi tien al la deklivo oni ja iradis flugigi kajtojn – ankaŭ kun „la Maljuna“! Kun teruro li ekkonsciis, ke tio estis preskaŭ antaŭ duonjarcento. En bonvolema krepusko sovaĝigitaj herbejoj sen kultivado faris agrablan iluzion de iamaj kampoj kaj paŝtejoj. Forlasitaj ruinoj kun restaĵoj de tegoloj, inter kiuj siblis la vento, denove rememorigis domojn, muelejojn kaj bienojn. Fendiĝinta griza strio de asfalta frakasaĵo kovrita de urtikoj kaj herbaĉo aspektis entute kiel iama veturvojo.

La altkreskulo progresis tra la alta herbo al la celo, kiu jam videblis. Kiel obskura insuleto en maro en la horizonto konturiĝis malnova tombejo dense kovrita de arboj. Ĝi situis izole malproksime de la urbeto ĉirkaŭigita per eksaj kampoj, kiuj antaŭlonge iĝis granda rubejo. Apude altiĝis arbizita monteto, kiu abundegis je ĉiuj koloroj de aŭtuno. Belega loko por la lasta ripozo, ekpensis la viro. Kaj ankaŭ ideala loko por renkontiĝo ekster atingo de neinvititaj oreloj, mikrofonoj kaj kameraoj, flanke de la malsataj detektiloj de dronoj. Vere, „la Maljuna“ scias, kio decas.

Finfine li alvenis al la duondisfalinta tombeja muro. Li alpremiĝis al ĝi kaj atente sondis la misterplenan tenebran arbareton, kiun ĝi ŝirmis. En la obskuro sub la arbokronoj troviĝis vicoj de malbonstataj tomboŝtonoj kaj krucoj kreskitaj de hedero, malantaŭe kontraŭflanke siluetiĝis trista ruino de kapelo. Ĉio dormis en absoluta silento kaj senmoveco. Unusola signo de vivo estis flameto de kandelo, kiu lumis en vitra lanterno sur unu el la tomboj.

La vizitanto eniris per knara malantaŭa pordeto kaj sur la ĉefa vojo li malrapide paŝis renkonte al la lumo de la lanterno, kiu gvidis lin ien al la kapelo. Kiam li proksimiĝis al la loko, li ĉirkaŭrigardis, sed li vidis neniun. Trankviligis lin tamen la bone konataodoro de virginia tabako, kiun li sentis en la aero. La tombo kun la brilanta lanterno estis kontraste kun ĉiuj aliaj ordigita kaj la ora enskribo sur ĝi aspektis kvazaŭ nova. „Ĉi tie en la Sinjoro ripozas...“, li eklegis, kiam li sentis movon malantaŭ si. Li turniĝis kaj ekvidis viron en nigra mantelo kun ĉapelo sur la kapo.

„Bonvenon. Mi jam atendas vin,“ diris mallaŭte la viro en ĉapelo kaj kun indico de neĝoja rideto li donis la manon al lia gasto. „Akurata kiel ĉiam.“

„Mi ĝojas revidi vin,“ murmuris la longegulo. „Sed ne estas facile veni ĉi-tien. Pasi tra tiu sovaĝlando! Mi preskaŭ ne rekonus tion ĉie tie. Sur tia deklivo ja iam estis solida vojo.“

La viro en ĉapelo suprentiris la ŝultrojn. „Ĉio ŝanĝiĝis. Ĉi tie kiel aliloke.“

„Sed tio estas laŭdinda, ke lokojn por renkontiĝoj vi scipovas elekti perfekte. Vidpunkte de mia profesio mi ne havas ion por riproĉi,“ montris dentojn la gasto.

„Singardemo estas ĉiam necesa,“ diris lakone la alia. „Alkutimiĝu. Post la elektado jam ne funkcios alie. Ni devos esti ege atentemaj. Cetere, tio validas ankaŭ por hodiaŭ. Ni bezonas paroli en kvieto.“

„Kvieton oni certe havos sufiĉe ĉi tie. Tiuj jam nenion malsekretigos pri ni,“ ekridis la longegulo. „Sed la medio ne estas tre optimisma, vere? Iome teruriga. Ĉu vi rememoras la filmon, kiun ni vidis kiel knaboj en la somera kinejo? La hororo, en kiu...“

„Hororo? Kiel en hororo mi sentas min nur tie malsupre!“ kraĉetis la viro en ĉapelo indikante al la urbeto. Poste li turniĝis kaj kun nuba rigardo direktita ien inter la tombojn deklamis kiel predikanto: „Vi havas la honoron esti en la plej bona socio, kiun ni havas ĉi tie. Preskaŭ ĉiuj valoraj homoj de la urbo, jam estas ĉi-loke. Tio, kio restis tie ... tiu homa skorio – tio naŭzas min... Sed fakte estas tiel ĉie en tiu ĉi ŝtato. Bonaj kaj decaj homoj jam pliparte delonge kuŝas en la tero. Ili ripozas en tiuj ĉi silentaj verdaj ĝardenoj kaj atendas nin, kelkajn lastajn malfruiĝintojn, perdiĝintojn en la tempo ...“ Li softe mankaresis la eĝon de apudstaranta tomboŝtono. „Ili vere bonŝancas ne ĝisvivi ĉion ĉi...“

La longegulo serioziĝis kaj ekprenis preskaŭ ekskuze. Kvankam li tute konsentis kun la opinioj de la „la Maljuna“, tiujn mornajn monologojn li ne ŝatis, kaj vere ne estis agrable aŭskulti ilin en la deprima medio de la vespera tombejo. Por deturni la parolon alitemen, li elaktujigis dikan dosieron kaj signife ekfrapetis ĝin. „La kompleta materialo, kiel vi deziris.“

La viro en ĉapelo rapide transpasis en realisman tonon. „Bone, ni eklaboru.“ Li transprenis la dosieron kaj komencis foliumi. La longegulo dume eksplikis: „Ŝajnas, ke nia amiko vere ĉesis ferii. Dum la lastaj du semajnoj kameraoj kaptis movon ĉe kelkaj niaj objektoj. Pasintvendrede du uloj gaxis ĉirkaŭ la kastelo en Liteň kaj fotis ĝin el ĉiuj flankoj. Mi kontrolis la registraĵojn el aliaj lokoj kaj trovis, ke la samaj du fotis dum tiuj tagoj ĉe ok pluaj objektoj. Iu juna virinaĉo semajnfine spionserĉis en Drahenice kaj volis konfespreni memorulojn pri... vi ja scias. Mi esploris tion kaj estas homoj el la detektivejo Vestigo el Brno.“

„Jes, tio estas lia stilo. Bonege. Brila laboro,“ kapjesis „la Maljuna“ daŭre studanta la materialojn. „Mi havas informojn pri similaj aktivajoj ankaŭ de aliaj fontoj. Ŝajnas, ke li nun troviĝas en stadio, kiam li diskrete preparas dokumentadon, ampleksigas konojn, serĉas novajn kontaktojn. Li silentas kaj pensas, ke li estas nevidebla. Li tute certe planas meti tion antaŭ nin post la elektado aŭ direkte ofertas siajn servojn al la nova registaro.“ Li grimacis. „Sed ĉi-foje ni estas unu paŝon antaŭ li. Mi neniam plu faros la saman eraron, kiu kostis nin tiom multe.“

„Sed vidu – se ni havus pli da uloj kiel li, ni povus rezigni tion. Kvazaŭ li neniam havus sufiĉe! Neniu amasigis la mamonon tiom kiel li. Kaj ni financis lian

forveturon en varmajn landojn! Se iu devus montri iomete da dankemo, do mi ne scias, kiu alia.“

La viro en ĉapelo malgaje ridetis. „Dankemo? Ĝi estas nur avida atendado de avantaĝoj, kiuj devas veni nur en la estonteco – diras klasikulo. Dum li pensis, ke ni havas ion por oferti, li estis dankema kaj ege utila. Dum li direktis siajn kapablojn kontraŭ niaj adversuloj, li estis por ni granda subteno. Poste li simple malbone pritaksis la situacion. Senlima monavideco eklipsigis lian brilan intelekton.“

„Mi ĉiam diradis, ke estas danĝere kunlabori kun kanajloj kiel li.“

La viro en ĉapelo kapneis. „Kaj mi ĉiam diras, ke ni devis plene ekspluati la materialon, kiu diponeblis. Homoj havas diversajn kvalitojn. Kun tiuj, kiuj ne havas iujn idealojn, oni povas ofte kunlabori multe pli bone. Tiuj estas facile motivigeblaj. Kun tiu ĉi escepto tio funkciis bone ĝis nun. La celo pravigas la rimedojn. Por nia nobla celo tio validas des pli. Se tio signifas, ke ni devas helpi al kelkaj friponoj plenumi iliajn revojn, al kelkaj stultuloj doni okazon senti sin gravaj ...“ Li mansvingis. „Kun tio ĉi mi ĉiam plene kalkulis. Oni havis fontojn. Oni havis ion por oferti. Ĉiam estas io por oferti.“

„Ĉiuokaze ni ne devus atendi plu,“ insistis la alia. „Vi scias, ke ĉio estas delonge preparita.“

„La Maljuna“ dummomente silente rigardis la brilantan kandelon, poste li forigis ĝin el la lanterno kaj starigis ĝin sur la supera eĝo de la tomboŝtono. Mallaŭte li rimarkis: „Pacienco estas kunulo de saĝeco. Estis racie atendi kelkajn monatojn. Sed nun tempas startigi ĉion.“ Longegulo malrapide kapjesis kaj lia vizaĝo ekbrilis je kontenteco.

Ambaŭ viroj rigardis, kiel la flameto de la kandelo trembrilas en la vento. „Nia amiko ludas altan ludon kaj tie supre blovas,“ diris „la Maljuna“. Post kelkaj sekundoj la flamo estingiĝis kaj la tombejo senlumiĝis. Dum momento ili staris silente, ĝis la viro en ĉapelo kun suspiro rimarkis: „Sed estas domaĝo. Homo de lia inteligenteco kaj kapabloj povis fari por nia afero ankoraŭ multe.“ Li ŝaltis la lumon en lia komunikilo kaj indikis al benko. „Do kio? Ni sidiĝu kaj priparolu ĉion trankvile.“

Post ne-plena horo la longegulo estis revenanta al lia aŭtomobilo sur la deklivo sur la vojo, kiun nur li mem paŝpremis. Li sentis agrablan maltrankvilecon pro la venontaj taskoj akompanata de iomete pli alta sangopremo kaj pli rapida korbatado, kaj ĝuste tion li ŝatis. Rigardo al la valo, kiu jam merĝis en mallumo, rememorigis al li lian kanton. „*La brilo de mia fajro estingiĝas, baldaŭ mi kuŝiĝos. Kaj vi en miaj rememoroj venos al mi por deziri al mi bonan nokton...*“

Tio estis komenco de la dua ĉapitro de interreta daŭrigota romano. La tutan ĉapitron kaj ankaŭ la unuan oni povas legi sur <https://zitravsejinak.wordpress.com/> ĉeĥe. Vizitu ankaŭ la paĝon <https://www.facebook.com/zitravsejinak> en Facebook, kie oni povas sekvi ĉiujn aktualaĵojn pri la verko.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze
pobočný spolek Českého esperantského svazu
C/o Jiří Mišurec
Jirečkova 5
170 00 Praha 7